# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 9 Septembro, 2016

*Kara Leganto, vi jam jam scias de antaŭa n-ro de nia bulteno pri la planata E-renkonto, planata samtempe en multaj lokoj de la Norda Ameriko. Pri la evento en Ŝikago raportas ĝia organizanto H. Becklin. Ni daŭras aperigi memoraĵojn pri la lasta UK en Nitro. Tio ĉi estas gajno de E-movado.*


*Lastatempe okazis du gravaj perdoj, ambaŭ en Germanio: forpasis fama esperantologo d-ro Detlev Blanke (1941-2016) kaj laŭreato de la Nobel-premio pri ekonomiko d-ro Reinhard Selten (1930-2016).*

*<u>ATENTON</u>: Septembra kaj Oktobra kunsidoj de nia E-societo okazos ne marde, sed merkrede.* –La Redaktoro



## Paralela Universo en Ŝikago *de Hanso Becklin*

La 20an de Aŭgusto la Nord-Amerika esperantistaro kunvenis preskaŭ samtempe en 25 lokoj – en Kanado, Usono, Meksikio kaj Kubo. Kompreneble, al nia kara urbo tiu evento ne mankis. Mi entreprenis la planadon frue en la somero, kaj fine publikigis la Ŝikagan planon en Julio. Tiutempe la eventaro ŝajnis iomete malforta, sed ĝi rapide kreskis en la somera varmo. Tra la kontinento la planintoj esperis, ke ili povis disvastigi la informojn kiel eble plej vaste – precipe al homoj, kiuj ne jam ligiĝis kun la tradicia Esperanto-movado.




Mi uzis kelkajn rimedojn, plejparte interretajn, por trovi novajn kaj nekonatajn Esperantistojn. Mi pene serĉis en Fejsbuko kaj Tvitero homojn, kiuj jam konis nian lingvon, sed deziris helpon por ekzerci sin parole en Esperanto. Mi ja trovis plurajn homojn tiajn. Preskaŭ ĉiu lernis Esperanton per Duolingo. Multaj homoj diris al mi, ke ili revis pri tia evento antaŭe, kaj streĉos ĉiun forton por veni.

Venis la atendita tago – kun matena pluvego. Bedaŭrinde, multaj homoj ne volis vojaĝi pro la tempesto al la najbarejo, kiun mi elektis (Hajdparko). Interese, patro kaj filo el Madisono, Viskonsino ne timis la veteron kaj vojaĝis tiel for de sia hejmo. Alia bravulo, ankaŭ nekonata, estis juna doktoro pri germana literaturo, kiu ekamis Esperanton antaŭ tri monatoj. Krom tiuj homoj, nur mi kaj alia aktiva membro de nia klubo ĉeestis la kunvenon.

Ĉu la evento sukcesis? Ni ja eltrovis plurajnnovajn esperantistojn, kiuj volas partopreni eventojn, malgraŭ ilia (tute komprenebla) deziro ne vojaĝi eksterhejmen. Tra Norda-Ameriko, nur kelkaj eventoj vere rikoltis grandan faskon da komencantoj. Indas mencii Vaŝingtonon, kie monata grupo fondiĝis tuj post la evento pro la neatendita pasio de la tiea esperantistaro. Sed en la plejmulto da lokoj apenaŭ io diferencigis tiun eventon de tradicia festo, kiel somera pikniko aŭ Zamenhofa Tago. Samkiel tiuj eventoj, oni logas pli grandan kvanton da esperantistoj per la promeso, ke la evento daŭros plurajn horojn kaj okazos en la mezo de semajnfina tago. Bedaŭrinde, novaj esperantistoj ne inundis la eventojn tiel, kiel mi esperis.

Kion mi lernis de tiu sperto? Unue, estas malfacile trovi novajn Esperantistojn, eĉ en la nova kampo, kiun la kreskantaj Esperanto-komunumoj de la interreto bone sterkis. Sed oni ne rajtas diri, ke estas nur unu reta komunumo por Esperanto-parolantoj – ili vere estas pluraj, kun siaj propraj partioj. Sed la plej granda leciono por mi estis tio: deziro aktiviĝi en reta komunumo ne nepre transiras al karna komunumo.

Due, ni devas detrui ĉiun barilon, kiu staras inter ni kaj sukcesaj eventoj. Ekzemple, mi elektis mian najbarejon (Hajdparkon) kiel la loko por la evento. Miaj kialoj ne malbonis: abundas parkejoj kaj muzeoj senpagaj. Sed mi ne pripensis la malavantaĝojn – Hajdparko estas kvazaŭ vilaĝo en la urbo, sen eĉ unu metroo-linio; oni devas piediri por atingi multajn vidindaĵojn ĉe la Universitato de Ŝikago. En la estonteco mi provos lokon por komencanta kunveno en la "Loop" (la negoca kvartalo de la urbocentro), atingebla per ĉiu metroo-linio kaj ĉiu suburba trajno. Eble tio pli konvenas – sed ne nepre. (Kion faros homoj, kiuj preferos ŝofori?) Kia laboro arigi homojn – sed, kia ĝojo sperti mirindan etoson eĉ plian fojon!

# Sukcesa UK-101 en Nitro (2) *de Araneo*



Post 10-jara paŭzo de Vilna UK en 2005 mi denove kongresumis pasintjare en Lillo kaj ĉi jare en Nitro. Se franca forumo kun 2700 partoprenintoj estis brilanta kaj bunta, kiel Francio mem, la slovaka UK kun duono malpli da kunigintoj estis intima, amikeca, eĉ – najbareca kun simila lingvo (ekster kongresejo).

Mi planis veni al Nitro sabate vespere, renkonti mian samurbanon (el Ukrainio) d-ron I. Halajĉuk, kiu partoprenis UMEA-konferencon, sed pro la problemo kun flugkompanio LOT mi maltrafis mian flugon al Budapeŝto, pasigis nokton en Varsovio, atingis UKon nur dimanĉe vespere, forestinte Solenan Inaŭguron, sed ĉeestinte brilan Nacian Koncerton. Dank'al prezidanto de UkrEA Eŭheno mi eĉ sate vespermanĝis antaŭ la koncerto. Multkoloraj kostumoj, viglaj dancoj, belaj kantoj, lertaj muzikistoj – ĉio impresis. La tuta spektaklo okazis sur la centra urba placo, ĝin rigardis ankaŭ urbanoj kaj ne-Esperantaj gastoj de Nitro.

Se lundo estis iom libera tago por mi, marde mi E-eklaboris de la frua mateno, kiam ni vizitis matenon meson en katolika preĝejo de Sanktaj Petro kaj Paŭlo, servata fare de sac. Serhij (Prudko). "Pacon al vi!" deziris li al ĉiuj persone (aktuala por Ukrainio, ĉu?). Tage abundis renkontoj kun multaj malnovaj gesamideanoj el Britio, Suomio, Pollando, novaj el Kubo; ankaŭ interesis min rezultoj de Belarta konkurso. Dum ĝiaj anoncado okazis prezentado de la tradukita poezio. Reprezentantoj de 14 diversaj lingvoj legis esperantlingvajn tradukojn. Nia prezidanto Les' havis okazon prezenti la poemon de la pola Nobel-premiito Wislawa Szymborska kaj laŭtlegis ŝian kortuŝan poemon "Kato en malplena loĝejo" (*vd malsupre*). Post la sufoka aero en la salono malvarma slovaka biero pretigis min al koncerto de "Kaŝe Kaŝita" – blindulo kun melodia voĉo.

Ekskursan tagon mi pasigis en malnova Trnavo, sed pli plaĉis al mi vin-gustumado en privata familio vinejo de iu Anton: li finis nutraĵ-teknologian altlernejon en Odeso (UKrainio) kaj eĉ ĝis nun li bone parolas la rusan. Oni devas mencii, ke en ĉiutaga kongresa bulteno "Pribina" aperis limerikoj pri diversaj eventoj, kiujn verkis Russ Williams. Jen estas "Limeriko post vingustumado":

Dum vingustumado tre rava
plej plaĉis al mi la Palava.
en bona etoso…
ebria ĥaoso…
Sed ĉu mi vekiĝos kadavra?

Por mi ĵaŭdo (fakte, mia lasta kongresa tago) estis la plej impresriĉa: matene mi vizitis kunsidon de kelkaj fakaj asocioj, je la 3-a ptm – piedpilka matĉo inter E-teamo kaj lokanoj, ni denove malvenkis sur la lasta minuto: 4 – 5. Rapida duŝo kaj surmetinte ukrainan broditan ĉemizon mi kuris al urbestra akcepto. Ambaŭflankaj (de UEA kaj urbestraro) dankvortoj, sandviĉoj, vin- (ne gustumado, sed) konsumado kaj mi denove kuris al impona konstruado de la Nitra Divadlo (teatro), kie vespere Georgo Handzlik (Pollando) kaj Saŝa Filipoviĉ (Serbio) prezentis "La kredito"n. Bonega unuhora ludo! Kaj post-spektakla bier-vin-ktp konsumado en mallarĝa rondeto, ĝis la noktomezo. Ankoraŭ unu "Limeriko post *La kredito*":




Spektaklo pri banka kredito
kun multa komika profito:
Georgo kaj Saŝa,
intrigo ĉantaĝa,
kaj, neeviteble, kokrito.

Matene, je la 5:26 mi envagoniĝis. Adiaŭ, Nitro! Mia kara Ukrainio, renkontu vian vagantan filon!

P.S. *Pri financoj*. Dum la lasta kongres-tago okazis aŭkcio gvidata de Humphrey Tonkin, kiu portis al UEA preskaŭ 1500 eŭrojn. La plej alta prezo estis ĉe la kongresa numero 1 de la sekva UK en Seulo kostis 350 eŭrojn, kongresa numero 102 (sama, kiel numero de la Kongreso) – 150 eŭrojn. Oni disvendis ankaŭ multajn librojn kaj esperantaĵojn.


## Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Randy Ream
1835 N. Natoma Ave., Chicago, IL 60707
773-262-7738
www.esperanto-chicago.org


## Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Randy Ream
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Karlo Gunn
Membro – Hans Becklin

## MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn
828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105

## SEKVANTAJ KUNSIDOJ

1350 N. Wells St., Ŝikago. Bonvenon! Apudas stacioj: Sedgwick (Bruna linio) kaj Clark/Division (Ruĝa linio). Por senpaga parkejo bv telefoni al Viktoro: (773) 344-2276. Vi rajtas preni vian ŝatatajn ne-E-amikojn, manĝaĵojn kaj trinkaĵojn (dolĉakvon, bieron, vinon ktp).

**28an de Septembro (Merkredo)** – La 101-a UK en Nitro (Parto 2)

**26an de Oktobro** – Temo estos anoncata

**11an de Decembro** – Zamenhofa Tago